Prezo 7€

Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org
julio-aŭgusto 2012, n-ro 07-08 (1285-1286)

# Sennaciulo

## Tem-dosiero "Fukuŝimo"




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Novaj popoltavoloj ĉe kontraŭatomenergia protesto en Tokio

Laŭtakse 170 000 homoj utiligis nacian festotagon la 16-an de Julio 2012 por amaskunveni sub la devizo *Sayonara Nukes* (Adiaŭ atomarmiloj) en la tokia *Yoyogi*-parko [jojogi]. La amaskunveno, aranĝita de konataj personuloj de la kultura vivo kaj aliaj, altiris aktivistojn de konata tipo, t.e. sindikatoj, konsumanto-asocioj ks., sed ankaŭ partojn de la civitanaro, kiuj ĝis nun ne kutimas manifestacii.

Regeaj, funkaj, hiphopaj kaj popolrokaj bandoj prezentis kontraŭnukleajn kanzonojn, je kiuj la publiko spite la varmegon dancis en festa etoso.

Unu el la organizantoj, la ilustristino *Misao Shinoto* [misao ŝinoto], estas la ĉeforganizanto de ĉiusemajnaj vendredaj kontraŭnukleaj protestoj antaŭ la oficejo de la ĉefministro, kiuj altiras pli da protestemuloj al la tokia politika distrikto *Nagatacho* [nagataĉo], ol venis iam ajn post la kulmino de la studenta movado en la 60-aj jaroj. Ŝi atribuas la sukceson de la vendredaj protestoj al tio, ke ili havas "specifan celtabulon: la ĉefministron *Noda* kaj lian registaron". Tiel la partoprenantaro kreskis de 300 komence, en Marto, al dekmiloj en la lastaj semajnoj. "Ni jam scias, al kiu direkti nian koleron hodiaŭ, kaj junaj homoj ŝatas nian rektvojan, konkretan proteston", ŝi klarigas.



"Ni devas pli fidi nian movadon, ĉar la situacio povus esti multe pli malbona, se ni ne levus niajn voĉojn", diris la aktorino *Miyuki Matsuda* [mijuki macuda] antaŭ centoj da spektantoj, reference al tio, ke ĝis nun nur unu el la 50 japaniaj atomcentraloj refunkcias. "Ni devas daŭrigi ĝis la tago, en kiu ĉiuj reaktoroj estos aboliciitaj, ĉar la mondo precize rigardas, kiel japanoj povas decidi pri sia propra sorto."

La gitaristo *Sugizo*, membro de du el la plej influaj rokbandoj en Japanio, *Luna Sea* [luna si] kaj *X Japan* [eks ĝepen], konstatas, ke eĉ rokmuzikistoj emas silenti pri la afero, "ĉar ili timas riskojn" por sia kariero. "Sed muzikistoj, kiujn mi vere admiras, de *Bob Dylan* [bab dilen] ĝis *John Lennon* [ĝan lenen], gardis sian artistan integron per tio, ke ili elparolis en la socio favore al tio, kion ili kredis. Eble mi estas nur simplanima, sed ankaŭ mi kredas, ke rokmuziko devas servi kiel averta voko, kiu movas la socion en pli bona direkto."




*Shinoto* diris, ke aktivi politike estas ĉiam ankoraŭ granda ŝarĝo en Japanio, kaj ŝi citas la akrajn kritikojn kaj atakojn, kiuj aperas en interreto kontraŭ ŝiaj vendredaj protestoj, eĉ iafoje de malnovtipaj maldekstruloj taksas ilin tro molajn aŭ naivajn. Ŝi diras pri si mem: "Mi ne estis dekomence vere politika homo, kaj mi lernas, ke tio postulas multe da sinofero, tempa, mona, spirita. [...] Sed la protesto, kiun ni komencis, disvastiĝas tutlande, kaj ne rezignos nur la tagon, kiam ni gajnos palpeblan venkon – la fermon de ĉiuj nukleaj reaktoroj en Japanio." ★

*Kompilita de* Gary Mickle *surbaze de artikolo de* Hiroshi Matsubara *[hiroŝi macubara] en la ĵurnalo* Asahi Shimbun *[asahi ŝimbun] 2012-07-16:* http://ajw.asahi.com/article/0311disaster/fukushima/AJ201207160093
- [http://goo.gl/iwUtT]

# Enhavo


**Tem-Dosiero "Fukuŝimo"** **4**

Prokuroroj ne enketas pri krimkulpigoj rilataj al la akcidento en Fukuŝimo 8

"Hejmloko" kaj Atomcentralo 9

Laboro en Fukuŝimo estas infero 9

Ĉu kontraŭatomenergia movado estas utopiisma? 11

Lernu lecionojn el Aŝio kaj ĉi-foja katastrofo 13

Japanio eksportos atomcentralon al Vjetnamio 14

Fukuŝimo-Gundremingen' 15

Kontraŭatomenergiaj aktivistoj malliberigitaj en Belorusio pro ilia protesto kontraŭ interkonsento kun Rusio 16

**SAT Aktivas** **17**

"Solar Impulse" – sun-energia aviadilo 17

Bonvolu ne atendu plu! 20

Amnestio Internacia alvokas la Usonan registaron pri la kvin de Kubo 21

La kaŭzoj de la krizo kaj novaj modeloj ekonomiaj 23

Agrara Reformo en la 21-a jarcento: Konstrui novan perspektivon, redefini strategiojn kaj celebri venkojn 24

La alterna sistemo de metilernado 25

Verduloj kaj SAT: komunaj ideologiaj trajtoj 26

Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj 28

**SAT-aj Diversaĵoj** **29**

De niaj legantoj 29

100 argumentoj kontraŭ atomenergio 30


***Karaj legantoj! Ĉi tiu numero estis plejparte preparita antaŭ la somerferioj. Ĝi tial ne enhavas la prikongresajn informojn, kiu aperos en la septembro-oktobra numero.***


***Praktikaj informoj***

Sennaciulo estas oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de SAT: 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: + 33.9.50.71.01.97

Retadreso: satesperanto@free.fr

Retejo: http://satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n°1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

**Plenum-Komitato de SAT**

Prezidanto: Vinko Markovo

Sekretario: Tereza Sabatier

Kasistino: Franjo Lévêque

Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent

**Sennaciulo**

Ĉefredaktanto: Robin' Beto

Enpaĝiganto: Pierre Soubourou "Ŝtonĉjo"

Ceteraj redaktantoj: Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale, Serĝ' Sir', Ŝtonĉjo

**Kontribuojn sendu elektronike al:**

sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paper-poŝte al SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: TROISA, Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart, Francio. Aperas dumonate – Bimestriel.

Directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono: France 57€, autres pays / aliaj landoj: demander le tarif à notre agent du centre de SAT / peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépôt légal à la date de parution: N°CPPAP 0515 G 86567